

Numero: 227.
Aprilo 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Aprila rideto

Mi promenas en parko kaj mi rigardas la vekigantan naturon. La arboj kaj arbustoj komencas verdiĝi. Tie birdeto ĝojas, ĉar varmetaj sunradioj karesadas ĝiajn plumojn. Ĝi vigle triladas salutante la printempon.

Ankaŭ la homoj ĝojegas kaj feliĉe ili preteriras mi.
Kiom bonega estas tiu ĉi tago!

Mi ŝategas la printempon. Ĝi donacas al ni feliĉon kun bonodoro.

Printempe renovigas la naturo post la longa vintra dormo. Ni revadas pri libera vivo, kiam nia animo elfugas el nia korpo kaj ĝi ĉirkaŭflugas la tutan terglobon.

Ho, kiom bone estas flugi super la nuboj, kiel la birdoj! Malsupre centmiloj da homoj kaj de tie oni ne vidas ilian malĝojon.

Eble tial la birdoj estas gajaj kaj ili trilas al ni dolĉajn kantojn, kiuj enpenetras nian koron vekante grandiozan senton.



Belega estas la printempo. La aprilo ridetas kaj ĝi ŝutas esperon en mian koron. Ĉio floras kaj verdas. Mi volus brakumi la tutan mondon kaj kriegi: „Homoj mi amas vin.”

Espereble ne nur mi sentas tiel, sed ankaŭ miaj homfratoj, kiuj haltas unu momenton kaj ili ĵetas rigardon al la pompanta parko.

Estus bone, se en iu tago aprila ĉiu ekirus kaj ĝoje vizitus proksiman arbaron aŭ kampon kaj tie pasigante kelke da horoj refreŝigante reirus en la betonĝangalon.

Mi petas vin homo, kiu loĝas inter ŝtonoj, ne disiĝu de la naturo. Ĉiutage aŭdu ĝian voĉon kaj sentu en via koro kaj menso ĝian mesaĝon, ke ni vivu harmonie kaj pace unu kun la alia!

-Redaktanto-



Antaŭ la someraj vojaĝoj

Multaj homoj tiam renkontiĝas kun la manko de la lingvoscio, kiam vojaĝas eksterlanden. En vendejoj, restoracioj aŭ surstrate oni ne povas komprenigi sin.

Tie ni rekonsciiĝas, kiom bonege estintus ellerni iun fremdan lingvon en la lernejo aŭ ĉe privata lingvoinstruisto. Estas tre ĝene stari sur la strato nesciante la lokan lingvon. Oni nur balbutas kaj ekprovas komprenigi sin mane kaj piede. Ofte pro tiaj ĝenaj lingvaj miskomprenoj okazas ridindaj situacioj, kiuj estus eviteblaj, se oni scius fremdan lingvon.

Sed ellerni ĉiom da ekzistantaj lingvoj oni ne povas. Homa vivo ne sufiĉas por tio.

Kion fari?

Ĉu ni ellernu nur la plej disvastiĝintajn lingvojn? Nur kelkaj homoj estus kapablaj ellerni kvar aŭ ses lingvojn.

Ĝenerale la scio de unu fremda lingvo estas malfacila laboro por multaj homoj. Krome kiun lingvon ellerni, por ke ni povu orientiĝi per ĝi facile kaj senprobleme?

Certe nun multaj homoj dirus: „Ellernu la anglan kaj vi ne havos lingvan malfacilaĵon en la mondo!” Ili pravas, fakte la angla lingvo estas vaste disvastiĝinta sur la tuta terglobo kaj en multaj landoj ĝi estas oficiale uzata.

Ni geesperantistoj ne asertas, ke per tiu ĉi lingvo oni ne povas komprenigi sin kaj oni ne lernu ĝin. Sed tamen estus pli utile, se ni homoj elektus neŭtralan lingvon, kiu apartenas al neniu nacio. Eble tiu ĉi lingvo estas pli facile kaj pli rapide ellernebla, ol iu ajn nacia lingvo.

Por tiu ĉi celo taŭgas Esperanto kaj antaŭ la somera, eksterlanda ferio estus inde pripensi la aferon kaj komenci lerni la lingvon de doktoro Zamenhof.

Mi scias, Esperanto ne estas miraklo. Sen lernado oni ne povas posedi ĝin. Sed se oni diligente lernas tiun ĉi lingvon, tiam baldaŭ ekaperas la sukceso la kompreno inter diverslingvaj homoj.

Eble iam alvenos tempo, kiam per Esperanto la homoj superos la babelan lingvan ĥaoson kaj ni facilanime povos ferii en kiu ajn lando de la terglobo.

-Ŝaŝa-



La sekreto de kapelo

IV.

Ili marŝis almenaŭ ĝis vespero. Dumvoje okazis nenio. Ili iris kaj iris. Antaŭ ili ŝvebis la espero, ke fine ili alvenos ien.

Jam estis malhelo, kiam en la malproksimo lumoj vidiĝis. Kvazaŭ en la valo granda urbo estus situante.

Miloj da etaj lumoj brilis antaŭ ili.

-Vidu – diris la pli alta kaj eksaltis pro la ĝojo – tie estas urbo!

-Kiu urbo, ĝi estas? – demandis lia kunulo iom pesimisme – Ni iru tien!

Denove ili ekiris kaj la brilantaj lumoj donis al ili forton. Kvankam ili jam estis terure lacegaj. Ilin ege doloris liaj piedoj. La ŝuoj estis malkomfortaj kaŭzante dolorigajn vezikojn sur la plando. Nun tio ne interesis ilin. Kiel magneto tiel tiregis la du virojn la urbo en la valo.

Ili iris proksimume duonhoron, kiam ili atingis la unuajn domojn de la urbo. Ili estis tre malgrandaj, malriĉaj dometoj.

Lumo nenie estis videbla. La domoj estis malhelaj kaj forlasitaj. Ili kvazaŭ estintus en fantomurbo. Nur la stratoj kaj placoj estis prilumigitaj.



Jam pasis noktomezo, sed ankoraŭ ili renkontiĝis kun neniu.

-Kia urbo ĝi estas? – ili demandis unu de la alia – La tuta ĉi tiea mondo estas ege stranga. Kio okazos ankoraŭ?

Ankaŭ la urbocentro estis senhoma. Nenie ili vidis homon, eĉ hundon aŭ katon. Kvazŭ la urbanoj estus forlasintaj la domojn.

Ili trovis drinkejon. Tie fine ili povis manĝi, ĉar la tabloj estis plenaj de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Ili time metis la unuajn manĝaĵetojn en la buŝon, sed kiam ili konvinkiĝis, ke la nutraĵo ne estas danĝera, ili vigle komencis manĝi. Ili jam estis tre malsataj. Dio scias, kiom longe ili ne manĝis. Kiam ili ekiris, la aventuro ŝajnis bagatela kaj ili pensis, ke post kelkaj horoj ili revenos.

Nun ili jam vagadas en tiu ĉi subtera mondo de post tagoj. Nun estis la unua okazo, ke ili povis manĝi.

Ankaŭ la trovita vino estis fajna kaj ĝi preskaŭ ebriiĝis ilin. Baldaŭ eble pro la mamoro de la vino ili ekdormis kaj ĝis mateno ili ne vekigis.

Preskaŭ samtempe ili malfermis la okulojn. La suno jam brilis.

Ili komencis atenti la eksterajn bruojn, sed ĉio estis silenta. Vane ili traserĉadis la tutan drinkejon, nenie ili trovis la drinkejstron. Kvankam antaŭ ili sur la tablo estis freŝa matenmanĝo, varmeta lakto kun granda tranĉaĵo da pano.

-Rigardu, ni ricevis matenmanĝon! – diris mire la pli malgranda kaj gustumis la lakton – Ĝi estas bongusta. Lastfoje en infanaĝo mi trinkis tiom fajnmanĝon ĉe mia avino, kiu loĝis en fora vilaĝo.

-Kiu metis ĝin sur la tablon? – demandis la alia kaj tra la fenestro li rigardis la straton – Strange, hieraŭ nokte ĉi tiu aŭtomobilo ne staris antaŭ la drinkejo. Rigardu kiom olda veturilo! En la muzeo mi vidis similan. Nekredeble, ĉu ankoraŭ ĝi fukcias?



-Eble ĝi staris ankaŭ nokte tie. Pro la laceco kaj malsato ni ne vidis ĝin.

-Ne, mi certe rememoras, la aŭtomobilo ne staris tie ĉi. Mi iras kaj kontrolas kiu aŭ kio estas en ĝi. – li ekstaris kaj eliris el la drinkejo.

-Atendu, ankaŭ mi iras kun vi! Ne lasu min tie ĉi!

-Bone, venu! Mi nepre volas scii, kio okazas en tiu ĉi damnita urbo.

La tegmento de la motorujo ankoraŭ estis varma. Do antaŭ nelonge oni veturis per tiu ĉi aŭtomobilo. Sed kiu aŭ kiuj? Kie ili estas? Kial ili ne vidas la loĝantojn de la urbo?

Ili ne ricevis respondon. Nek la drinkejestro, nek la posedanto de la aŭtomobilo estis videbla, aŭ ili ĉiuj estas tie ĉi? Nur ili ne vidas la homojn?

Plifortiĝante de la manĝaĵoj kaj trikaĵoj ili ekiris malkovri la urbon.

Estis agrabla vetero.

En la urbocentro estis kelkaj elegantaj vendejoj kaj magazenoj, sed ili ĉiuj estis tre malnovaj, kvazaŭ ili reirintus plurajn jardekojn en la tempon.

Ilin preskaŭ frenezigis la rekono. Io strangaĵo okazis en la kapelo. Certe ilin kaptis tempospiralo kaj nun ĝi tiras ilin pli profunden.

Kiel liberiĝi el tiu ĉi ĝena situacio? – Ili ne sciis. Eble nun jam ili ĉiam restos tie ĉi kaj ili ne povos liberiĝi el tiu ĉi terura rondiro.

Ŝtoniĝante ili staris sur la strato kaj ili malgaje rigardis mute unu la alian.

-Ni tempovojaĝas – diris la pli alta.

-Kiel ni iras hejmen? – demandis la alia – Vi promesis, ĝi daŭros almenaŭ duonhoron.

-Apáti Kovács Béla-

-Daŭrigota-

Poezio

Alvoko al amo

Ho, Amo, vivkomenco, vivosumo!
Lumu por ni, per viaj gloroj mitaj,
sed, kiel ĉiuj mitoj, veraj! Fumo

kaj nuboj kaŝas vin de ni, perditaj;
sed brilu en la koroj, nin konsolu!
Trapiku la nubaron per zenitaj

radioj, vivmistero! kaj parolu
al ĉiuj kiuj solas, sen esperoj;
diru al ili firme, "Ne plu solu".

Venu al la perditaj de la tero,
kaj montru la ĉielon sen makulo,
per lumo el pli pura atmosfero!

Venu al sinturmenta, pala ulo,
eŭnuko de la cirkonstancoj; venu
al nervmalsanulino sur insulo

dezerta inter homoj; kaj serenu
por iu toleranta edzan ligan
netolereblan! Vidu, brilu, benu!

Alportu vivocekon, liberigon,
al ĉiuj kiuj sur malĝustaj vojoj
penadas venki strangan korp-instigon

perversan; kiuj kuras antaŭ bojoj
de nigraj hundoj; en profundaj histoj
portas la malebligon de l' amĝoj;

brulu por la putinoj, la sadistoj,
fraŭlinoj kun infanoj, kaj sterilaj
edzinoj; viktimoj de l' faŝistoj

kaj la viktimoj de si mem, kun brilaj
radioj benu ilin; benu ĉion
kio suferas; brilu por ekzilaj

pecetoj de l' homaro; portu scion
al ili, per la supernuba helo;
lumigu nian homan tragedion!

Preter perfido, naŭzo kaj kruelo,
vi ja ekzistas ĉiam; ĉar mi vidis.
Mi, dum momento... super nub-nivelo...

Ruinigitaj homoj koincidis
nur per kompato, eble per hazardo...
tamen, li amis; lia am' validis.

Ho, amo, ŝirmu en sekreta gardo
la senesperajn; ili vin perceptu,
almenaŭ malproksime, per rigardo.

Ke ili renaskiĝu kaj adeptu;
aŭ, se la eblo ne ekzistas plu,
la faton ili konu kaj akceptu:

ĉar mi, neniam nun en ama Du
estonte la Duono, mi, ruino,
estas pli eta ol ĉiela blu' –

kaj mia propra tristo kaj destino
nenion pruvas, kiel en la fiŝa
mondo pereas frajo laŭ rutino –

Naturo estas malŝparema, riĉa;
la lumo ĉiam brilos super ĉio
eĉ se mi mem restados malfeliĉa...

inter la nuboj, jen la lumostrio,
ĉiama lumo, ora kaj espera –
ho, Amo, nia vera iluzio,

kiu kondukas nin al vero vera!

Marjorie Boulton

Vi preteriras kun la luno

Meznokton aperas la luno
la mondo estas en silento.
Mi serĉas por vidi vian belecon
je la lumo de la luno.

Alvenas la suno
bananta la teron kun ĝia varmeco.
Vi preteriras kun la luno
kaj lasas al mi bedaŭron.

Sed la vivo ne haltas
kvankam via beleco franda
forlasas miajn sonĝojn
ĉar mi ĉiam esperas.

Yohanes Manhitu



Por infanoj



AVENTUROJ EN ESPERANTUJO

Sesa ĉapitro

La instruistino ne riproĉis ilin. Ŝi kare klarigis al ili, ke en la estonto sen permeso ne forlasu la lernejon. Kompreneble ili povos viziti la oĉjon Karlo, sed ili devas lerni.

Ili rapide endormiĝis pro la laceco kaj multe da aventuroj.

En la sekvaj semajnoj Peĉjo kaj Kristinjo alktimiĝis al la ĉi tiea vivo. Ili diligente lernis kun la aliaj gelernantoj.

Malgraŭ la bonteno la du geknaboj tre sopiris revidi siajn gepatrojn. Ili deziris reiri al la gepatra domo.

Ili traveturis per aŭtobuso la tutan Esperantujon kaj ili ekkonis la insulon. Kiam la vetero permesis, ili baniĝis en la oceano kaj ili sunumis sur la bordo ĝuante la varmajn sunradiojn.

Ili ofte vizitis sian maljunan amikon oĉjon Karlo kaj kun li kaj lia hundeto promenadis en la proksima parko.

En iu tago la maljunulo demandis ilin:

-Kiel vi fartas sur nia insulo?

-Ni fartas bonege – respondis Peĉjo – sed jam tre mankas al ni niaj gepatroj. Ni jam delonge ne vidis ilin.

-Jes, ankaŭ al mi ili mankas – aldonis iom triste Kristinjo – Kiel ni povus hejmeniĝi?

-Ĉu vi deziras forlasi Esperantujon? – demandis mire la oĉjo Karlo.

-Ne por ĉiam – ili diris preskaŭ samtempe – Iam ni revenos, sed nun jam estus bone renkontiĝi kun la niaj. Ili restis en tiu alia mondo.



La maljunulo komprenis la du geknabojn kaj li tuj parolis kun la instruistino. Ŝi tre bedaŭris ilian decidon, ĉar ŝi ekŝatis ilin.

-Por mi estas tre, tre malĝoja, ke vi volas forlasi la insulon. Sed kion fari, se vi decidis tiel. Certe viaj gepatroj jam malpacience atendas vin en tiu alia mondo, kie ankoraŭ la homoj parolas diversajn lingvojn. Ne forgesu, ni ĉiam tutkore atendos vin kaj ĉiun ĉi tie, kiu ellernas la zamenhofan lingvon.

Reiru kaj propagandu Esperanton por ke multaj homoj ellernu ĝin!

Peĉjo kaj Kristinjo promesis, ke ili agos tiel, kiel la instruistino proponis.

Ili adiaŭis de la samklasanoj kaj ĉiuj geamikoj kun kiuj ili konatiĝis sur la insulo.

Peĉjon ege interesis, kiel ili povos reiri al ilia mondo, ĉar ilia alveno estis mistera.

Antaŭ la forvojaĝo ili ankoraŭfoje vizitis la domon de la oĉjo Karlo kun la instruistino. La oĉjo donacis al ili belan fabellibron en Esperanto verkita de li kaj fine diris al ili:

-Mi salutas ankaŭ viajn gepatrojn kaj avon. Gratulon al via avo Peĉjo, kial li instruis al vi Esperanton. La mondo bezonas multe da tia avo, kia estas la via.

Ili adiaŭis unu de la alia kaj la du geknaboj estis enkondukita al malhela ĉambro kaj oni fermis la pordon. Ili restis duope longe. Kristinjo jam timis en la malhelo, kiam super ili akra lumo ekbrilis kaj ili memoris pri nenio.

En la sekva momento Peĉjo denove estis en sia ĉambro kaj ĝuste lia avĉjo venis.

-Nepeto mia, ĉu vi endormiĝis?

Peĉjo unue ne sciis, kie li estas. Multaj sekundoj devis pasi ĝis li rekonsciiĝis.

-Avo – li komencis – mi havis strangan sonĝon. Mi kun mia pola amikino estis sur insulo fore ie en la granda oceano.

Subite la avo interrompis lin:

-Ĝi estis Esperanto insulo, ĉu ne kara?

-Jes – ekmiris la knabeto – kiel vi divenis?

-Ho, iam ankaŭ mi estis sur tiu insulo! Estus bone, se en iu tago ĉiu homo vizitus ĝin. Ĉu ankaŭ via pola amikino Kristinjo estis tie?

-Jes. Ni tre, tre bone fartis sur tiu belega insulo. Ni ne havis lingvajn malfacilaĵojn. Ni povis komuniki kun ĉiu, tiu estu kiu ajn.

-Nun jam ankaŭ vi spertis la utilojn de Esperanto. Mi kuraĝigas vin, se vi estos plenaĝulo ankaŭ tiam uzu tiun ĉi lingvon ĉie kaj instigu viajn geamikojn, ke ankaŭ ili lernu ĝin!

Peĉjo promesis, ke li tiel agos kaj en iu tago li reiros al la insulo kun multaj gejunuloj. Espereble denove kun li estos ankaŭ Kristinjo. Tio estus la plej bona, se ankaŭ sur la tuta terglobo la homoj parolus kaj uzus la lingvon de la doktoro Zamenhof.

Lia avo karesis lian kapon kaj li lasis sian nepon revadi pri pli bela kaj bona mondo, kie la homoj povos komuniki senĝene kaj facile.


Espereble jam oni ne devos atendi longe, ke Esperanto disvastiĝu sur la tuta Tero.

-Fino –

-Apáti Kovács Béla-



Gajaj bildoj



Tiel finiĝis la konata fabelo


Gajaj bildoj




Reciproka simpatio



Antaŭludo



La spirito de la loko



Simio



Scivolemuloj